## Pri la malapero de sovaĝbestoj en safariparko

La jam de jaroj priplendata malpliiĝo de la nombro de grandaj sovaĝbestoj en la "Masaj-Mara Nacia Parko" ege ŝatata de vizitantoj de Kenjo estas nun dokumentita en unu el la plej ampleksaj esplorstudoj pri 6 sovaĝbestospecioj. Laŭ tio inter la jaroj 1983 kaj 2003 en la 1,5 mil kvadratkilometrojn granda regiono norde de Serengetio la nombro de ĝirafoj ŝrumpis je 95%. Krom tio oni registris 80% malpli da fakoĉeroj, 76% malpli da alcelafaj antilopoj (*Alcelaphus buselaphus*, la "kongonjo") kaj 67% malpli da impaloj (*Aepyceros melampus*, la "nigrakalkana antilopo").

La statistiko estis determinita per ĉiumonataj divenprovaj samploj. La sciencistoj ĉirkaŭ s-ro *Joseph Ogutu* de la "Internacia Dombesta Esplor-Instituto" (*International Livestock Research Laboratory*) en Nairobo/Kenjo, kiuj publikigis siajn eltrovojn en la plej lasta eldono de la anglalingva periodaĵo *Journal of Zoology*, parolas pri "drameca malkresko" kaj pri la neceso de tuja apliko de "drastaj, intense efikaj paŝoj". La postulo por kontraŭrimedoj koncernas antaŭ ĉio la setladan politikon rande de la rezervejo. Ĉar, kiel montris la esploristoj, la sovaĝbestaj populacioj ŝrumpis samagrade kiel pliiĝe disvastiĝis la vilaĝoj de la pli frue nomade vivantaj Masajoj je la randoj de la naturprotektejo.

En unu el tiuj "ranĉlandoj" (*Ranchlands*), kie oni – meze de la pasinta jarcento kalkulis 44 kabanojn, tie en 2003 estis registritaj 2700 kabanoj. La masajaj dombestoj pli kaj pli konkurencas kun la sovaĝbestoj migradantaj inter la rezervejo kaj la setlita ĉirkaŭaĵo. Ĉiam pli ofte okazas nun ĉi tie mortigadoj de sovaĝbestoj kiel venĝo aŭ damaĝkompenso por rompitaj kampobariloj, difektitaj resp. forrabitaj rikoltoj aŭ maroditaj akvoprovizoj. Kaj plie, dum periodoj de sekeco ĉiam pli da vilaĝanoj paŝtas, senpermese, siajn hejmbestojn en la naturrezervejo. (Fonto: *Frankfurter Allg. Zeitung*, 2009-06-21)

## Neniu ŝanco por ĉevaloj

Kial apenaŭ troveblas ĉevaloj en Afriko? Ĉar tie la muŝo ceceo, kiu transigas la por ĉevaloj mortigan malsanon "nagano", okupas vastajn regionojn – pli grandajn ol Usono. La zebroj, kiel proksimaj ĉevaloparencoj, ne devas malpli timi la malsano-kaŭzantojn. Sed ili havas armilojn kontraŭ la infektiĝon, nome siajn nigra-blankajn desegnojn. Kun siaj facetokulo la ceceo kapablas percepti nur tre malaltan kvanton da vidpunktoj. Ĝi do povas vidi nur malprecize kaj malmulte, kaj bezonas multege da pikseloj por vidi ion ajn. La zebrostrioj kune kun la cecefacetokula punktobildo rezultigas la t. n. muaran efikon (laŭ *Moiré*), ĉe kiu du desegnoj – aŭ plifortigaj aŭ reciproke neniigaj – nulige kaj interfere kovras unu la alian. Rezulto: la konturo de la zebro sin malplektas antaŭ la okuloj de la muŝo kaj tiu nur hazarde povas trovi sian celon. Tial la ceceo preferas sonde biri laŭ direkto de alia besto. Cetere, la zebro eĉ alĝustigas sin laŭdesegne – laŭ ĉiu unuopa okazo – al la medio, en kiu troviĝas la malsanon transiganta malamiko: ekzistas do malvasta kaj klara blanko-nigra ĝis griza ĝis iom brun-flava desegnoj. Tion malkovris la brita zoologo *Jeffrey Waage*. Inĝenia ulo. (2008-11-24)



## Ĉu en urbo, ĉu en kamparo

– kie la naturo povas pli libere disvolviĝi? En sia multeco la naturo multe pli bone prosperas enurbe ol surkampare. Mallonge dirite: ĉio estas pli bona ol troe sterkita maizkampo. Jam en la 1990-aj jaroj oni enketis en Nurenbergo/Germanujo sume 1100 sovaĝe kreskantajn hejmajn plantospeciojn: duoble multajn ol sur same granda areo en la ĉirkaŭa agrolando. Aldoniĝas al la enorma naturplant-multeco la ĝardenaj plantoj – de abeloj, burdoj kaj papilioj danke akceptita oferto.

Rilate al tio, de 2002 ĝis 2007 en iu grandĝardeno en la Munkena urboparto *Obermenzing* oni nombris 400 diversajn papiliospeciojn – ĉirkaŭ 10-foje pli ol en la malaltbavara agrokulturlando. Ekde jarcentoj la libera naturo estas grave trosterkita, kaj intertempe eĉ la kamparaj fiherboj estas en forpereodanĝero. Por protekti ilin, oni transbaptis ilin – kadre de eŭropuniaj subtenprogramoj – al "kamparaj sovaĝherboj". Ankaŭ la urbaj loĝantoj kun siaj revoj pri "vivo en la kamparo" esperas plenan sukceson. (2009-10-28)

## Reĝo de subakviĝantoj

Ĝi vere ne estas belulo, la marelefanto. Tamen la 5 metrojn longa kaj 4 tunojn peza plumpulo estas la mergiĝoĉampiono inter la marmamuloj. Nur du fojojn en unu jaro ĝi surbordiĝas – por amoroludado kaj hararŝanĝiĝo. Alie ĝi loĝatigas la vastaĵojn kaj profundaĵojn de la maro. De ĝiaj pariĝlokoj ĝis la nutradejoj en Pacifiko ĝi tranaĝas 21 000 kilometrojn. Tie ĝi mergiĝas en profundo de 1 500 m kaj povas resti subakve 2 horojn. Tion ĝi kapablas per granda sangovolumeno kaj pigmentoj, kiuj povas stoki altan oksigenkvanton.